

KUTIMOJ DE LA SORABOJ DUM JARO

Eldoninto: SORABA MUZEO BAUTZEN

Eldonjaro: 2001/2002

La flegado de la kutimoj iam ludis gravan rolon en la vivo de la kampara loĝantaro. La paso de jaro kaj la ŝanĝiĝantaj laboroj depende de tio fiksis la ritmon inter la ĉiutaga vivo kaj festotagoj. La vilaĝa monotoneco ofertis malmulte da distro. Des pli granda estis la antaŭĝojo al eksterordinara tago.

La kutimoj estiĝis diversmaniere; diversaj sekularaj kaj ekleziaj enfluoformoj formas ilian ĝermon. Antaŭkristanaj ritualoj, kiuj rilatis al sezonaj ŝanĝiĝoj inter heleco kaj malheleco, varmece kaj malvarmece, estis inkludataj post la kristanigo en la eklezian kalendaron. La strukturo de la malnovaj kutimoj iom post iom ŝanĝiĝis per sociala transtavigo kaj kutura interŝanĝo. Multaj kutimoj ricevis klare religiajn trajtojn.

Kutimoj kaj festoj iam estis celebritaj en simpla maniero. La granda laborkvanto kaj la manko de mono en la plej ofte kamparaj familioj ne permesis ampleksajn preparojn kaj altajn elspezojn.

En la Luzacio¹ oni renkontas multnombrojn da moroj kaj kutimoj, kiuj estas celebrataj de la soraboj de post jarcentoj. En setlejoj, kie la soraba lingvo jam ne ekzistas, la partoprenantoj malgraŭ tio konscias pri la origino de la kutimoj. Ne ĉiu kutimo estas samgrade konata al eksteruloj.

Ĝis la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento la plej multaj kutimoj nur sufiĉis al la propra intereso kaj ĝojo de la partoprenantoj. Intenco de reprezentado estis fremda al la flegantoj de la kutimoj. Dum la pasintaj jardekoj unuopaj kutimoj ricevis certan atrakciecon por la nesoraba publiko kaj estas ligitaj kun memprezentado de la soraboj, kio kompreneble influas ilian originan enhavon. Ekzistas la danĝero de la elmontrado de la soraba kulturo kaj de kultura simulado ligita kun tio.

LA ŜPINĈAMBRO KIEL ELIRPUNKTO KAJ FLEGEJO DE KUTIMOJ

Kun la lino, kun ĝia kreskado kaj florado precipe en la meza kaj malsupra Luzacio popola kredo kaj kutimoj estis ligitaj.

Ĉiuvespere la knabinoj renkontiĝis en la granda ĉambro ĉe kamparano por ŝpini. La "kantorka"², la antaŭkantantino, kondukis la ŝpinvesperon. Ŝi plej ofte estis la plej aĝa, kiu estis bone sperta

¹ Regiono en orienta Germanio konsistanta el Malupra Luzacio (norda parto) kaj Supra Luzacio (suda parto)

² Bazo de la vorto kantorka estas la latina vorto "cantor" (antaŭkantanto dum diservo resp. estro de preĝeja koruso)

ankaŭ en la tradicio. Lernotajn kantojn kaj ĥoralojn ŝi elektis kaj ekkantis ilin. La ŝpinĉambro, "přaza"³, ofte estis la elirpunkto de societema vivo en la vilaĝo kaj instruejo de soraba popola poezio kiel ankaŭ de la tradicio.

Přaza, do la ŝpinvespero, ĝenerale komenciĝis post la rikolto de terpomoj kaj betoj en la tago de Sankta Burkhardo (11-a de oktobro) aŭ en la tago de Sankta Marteno (11-a de novembro). Ĝis Cindromerkredo ili ĉiutage renkontiĝis. Nur dimanĉe estis laborferio. Kutime la knaboj dufoje po semajno havis promeson esti kun la knabinoj. Komenco kaj fino de ŝpinvespero, la lasta ŝpinado antaŭ la "dek du noktoj", la ŝpinvespera balo kaj la ŝpinvespera geedziĝo estis petole festitaj jako apartaj okazoj.

Fine de la 19-a jarcento la multloke kutima ŝpinado de la fajna linfibro ĉesis en la plej multaj lokoj de la Luzacio. Nur por la ekonomio oni persistis pri memteksitaĵoj. Do oni ankoraŭ plu ŝpinis kaj teksis ĝis la kvardekaj jaroj de la 20-a jarcento tie kaj tie. Estiĝis sakoj, mantukoj, littolaĵo kaj la universale uzebla herbtuko "trokawa"⁴. La kutimoj de la ŝpinĉambroj fariĝis pli leĝeraj. Oni renkontiĝis vespere por babiladi kaj nomis tion "přaza". La ŝpinvespera balo restis kelkajn jarojn pli longe ol la ŝpinvespero mem. Konservigis ĝis nun ekz. zapust⁵ kiel iama fino de la ŝpinvesperoj en la Malsupra Luzacio.

LA BIRDA EDZIĜFESTO

La birda edziĝfesto, la 25-an de januaro, estas populara soraba antaŭprintempa kutimo. Onidire tiun tagon "sroka", la pigo kaj la korvo, "hawron"⁶ geedziĝas. Ĝis la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento tiu kutimo estis flegata nur en la suprasoraba lingva regiono. Per koscia flegado en lernejoj kaj infanejoj dum la tempo de la Germana Demokratia Respubliko (GDR) la birda edziĝfesto baldaŭ trovis grandan plaĉon en la tuta germana-soraba regiono.

La 25-a de januaro estas ĝojfesto por infanoj. Ili starigas malplenajn telerojn en la malferman fenestron kaj ricevas kaŝe donacojn kiel pastobirdojn kaj dolĉaĵojn de la onidira edziĝfesta festeno. Per tio oni rekompencas la infanojn pro ilia amo al bestoj kaj la disĵetado de nutraĵo. En multaj infanejoj la infanoj akompanas la kutimon per kultura programo, dum kiu ili maskas sin kiel birdoj aŭ prezentas

3 prononcu: pŝaza

4 prononcu: trokaŭa

5 soraba festo, vidu la ĉapitron "Camprado"

6 prononcu: haŭron

soraban edziĝfestan procesion. Tien gepatroj kaj konatuloj estas invitataj.

La origino de ĉi tiu kutimo estas malcerta. Ĝi estas verŝajne relikto de mitaj imagoj. Dum antaŭkristana tempo oni disdonis manĝoferajojn al la fantomoj de la prauloj por gajni la favoron de la naturdioj kaj demonoj. La evoluo en faŭno kaj flaŭro montras rilaton al la dato: Ĉirkaŭ la 25-a de januaro kelkaj birdospecioj komencas nesti aŭ metis ovojn. Krome tiutempe la suko altiĝas en la arboj. La 25-a de januaro (Konverto de Sankta Paŭlo) estis festita iam kiel mezo de la vintro, dum la 16-a jarcento eĉ kiel fino de la vintro.

Fine de la 19-a jarcento sorabaj societoj komencis regule aranĝi societemajn vesperojn kiel "ptaĉi kwas"⁷, birda edziĝfesto. Post la dua mondmilito oni revivigis tiujn ŝatatajn aranĝojn. La Soraba Popola Ensemblo ĉiujare prezentas grandajn estradajn programojn por infanoj kaj plenkreskuloj okaze de la birda edziĝfesto. La vizito de tiuj aranĝoj estas same ŝatata de junuloj kaj maljunuloj.

LA CAMPRADO

La karnavalo, "zapust", apartenas al la kutimoj, kiuj estas abunde festataj en la malsupra Luzacio. Iam oni finis per tio la vintran laboron en la ŝpinĉambroj.

La camprado estas la plej malnova parto de la karnavala festo. La verŝajnaj fonoj de la camprado kiel petiro kuŝas en mitaj imagoj de la prauloj. Per la maskado, bruado kaj dancado danĝeroj por korpo kaj animo, domo kaj bieno devis esti deturnataj, kaj malamikaj demonoj devis esti detenataj. Maskovestitaj kaj maskitaj figuroj marŝis kun betulvergoj tra la vilaĝo kaj batis plenkreskulojn kaj infanojn. La vivpovo de la juna vergo onidire estis transigata al homo per tio. Al la plej malnovaj figuroj apartenis la duobla homo, la rajdanto de blanka ĉevalo kaj la cikonio, kiuj simbolizas la vekiĝantan printempon. Ankaŭ la urso, simbolo de la venkita kaj retiriĝanta vintro estas malnova figuro de la camprado.

Hodiaŭ ĉi tiuj figuroj malofte estas en la petiraj societoj. Anstataŭis ilin tiaj en modernaj kostumoj. La vilaĝa junularo bruante campras kun muziko de bieno al bieno kaj petas pri ovoj, lardo kaj antaŭ ĉio mono. Kiel dankon oni trinkas glaseton da brando, "palenc", kaj petas la dommastrinon al danco. La koletitaj donoj estas plej ofte manĝataj kelkajn tagojn pli poste dum la granda ovomanĝado.

7 prononcu: ptaĉi kūas

LA FESTA PROCESIO DUM ZAPUST

La kulminon de zapust formas la festa precesio, kiu okazas dum dimanĉo. Ĉirkaŭ tagmezo la knabinoj kaj knaboj el la vilaĝo renkontiĝas en gastejo por formi parojn. La knabinoj portas siajn festajn danckostumojn kun la broditaj silkaj koltukoj kaj blankaj puntaj antaŭtukoj. Kompletigata estas la popolkostumo per artlerte ligita kufo, la "lapa". Ĉiu knabo ricevas transdonita de sia partnerino zapustan bukedon faritan el paperfloroj, kiun li fiksas al la ĉapelo aŭ la roverso. Post danco en la salono la festa procesio formiĝas.

Dum la procesio oni faras honoran viziton ĉe meritoplenaj vilaĝanoj kaj transdonas zapustan bukedon al ili. La orkestro ludas serenadon. Kiel dankon la junuloj ricevas malgrandan lunĉon aŭ donacon en la karnavalan kason. Dum la vespero poste la karnavala dancado okazas.

Per la vira karnavalo la karnavala tempo estas finata. La lasta dancovespero estas rezervata por la geedzaj paroj. Ankaŭ ĉi tie la virinoj portas sian festan danckostumon.

PASKAJ KUTIMOJ

La paskaj kutimoj de la soraboj estas vaste konataj. La soraba regiono fariĝas pli kaj pli turistika magneto dum pasko. Dum la pasintaj jaroj evoluis tiurilate novaj esprimformoj kiel la paskobazaroj kun la ornamado de ovoj per tradiciaj teknikoj abo la pruvo revivigi la ovaruladon.

La paskofesto estas la plej grava festo de la kristana ekleziokaj centra evento en la printempa tempo. Por kristanoj kaj nekristanoj ĝi signifas la venkon de la vivo super la morto kaj la traviveblan komenciĝon de la printempo. La kantado de ĥoraloj dum la Sankta Vendredo kaj en la paska nokto, la tradicia ornamado de paskaj ovoj en la familioj kaj la procesioj de la paskorajdantoj konserviĝis dum jarcentoj.

LA KLAKADO

Dum Sankta Vendredo en la Luzacio la sonoriloj silentas. Sankta Vendredo estas la tago de la plej forta funebro, dum kiu oni memoras la morton de Kristo per silenta devoteco kaj komuna preĝado. Tial la katolikaj soraboj nomas Sanktan Vendredon "wulki pjatk", granda vendredo⁸. Ĉe la evangeliaj soraboj Sankta Vendredo estas ferio, dum

8 prononcu; ŭlki pjatk

kiu ĉia laboro ripozas. Tiu tago nomiĝas ĉe ili "ĉichi pjatk"⁹, kvieta vendredo. En kelkaj vilaĝoj de la soraba-katolika Luzacio la knaboj marŝas matene, tagmeze kaj vespere tra la vilaĝo kun siaj lignaj klakiloj kaj haltas antaŭ bildoj de sanktuloj kaj krucoj por preĝi. Survoje ili laŭte klakas por inviti ĉiujn kredantojn al interna preĝo. La lignaj klakilo plej ofte estas memfaritaj kaj familiaj heredaĵoj.

LA PASKORAJDADO

La paskorajdado formas en la katolika regiono la kulminon de la paskosolenaĵoj. Ĝiaj radikoj kuŝas en antaŭkristana tempo. Dum la rajdado ĉirkaŭ kampoj kaj herbejoj oni iam volis tiri magian cirklon, kiu devis forpeli kreskoĝenantajn fantomojn kaj deturni damaĝon de la juna semo. Nur en Ostro la ĉirkaŭrajdado de la kamparo antaŭ la procesio estas kutima ankoraŭ hodiaŭ. La kristana eklezio transprenis tiun paganan kutimon kaj transformis ĝin al procesio de rajdantoj.

La katolikaj kamparanoj petis pri la beno de Dio por la juna semo. En kelkaj lokoj la paskorajdado okazis pli ol 450 fojoj seninterrompe. "Křižer"¹⁰, en Esperanto "paskorajdanto" en vera senco signifas "viro kun kruco".

La kutimo esprimas kaj publikan konfesion al la kristana kredo kaj la konfesion al la sorabeco. La multe pli ol mil paskorajdantoj estas senescepte viroj kaj knaboj. Ili faras la preparojn por tiu tre peniga kutimo ene de la respektiva paroĥo. Al tio apartenas krom la interna sinteno al la procesio kal la eklernado de la kantoj la havigo de la speciala festvesto kiel ankaŭ la havigo kaj la prova rajdado de ĉevalo. Antaŭ ĉio dum la tempo de la GDR la havigo de ĉevalo kaj la partopreno en la procesio estis tre peniga kaj malfacila entrepreno por kelke da paskorajdantoj. Kvankam estas ree pli multe da ĉevaloj en la Luzacio, multaj bestoj devas esti venigataj el malproksimaj lokoj.

Rajdantojn, kiuj partoprenas la rajdado la unan fojon, la 25-an fojon kaj la 50-an fojon, verda, arĝenta aŭ ora kroneto sur la roverso. Ankaŭ la ĉevaloj estas lukse ornamitaj por la procesio. Dimanĉon antaŭtagmeze la paskorajdantoj pare rajdas al la najbara paroĥo por peti pri la beno de Dio por sia vilaĝo kaj samtempe anonci la resurekton de Kristo. Ĥoralo eksonas dum la ĉirkaŭrajdado de preĝejo kaj tombejo. La pastro transdonas la statuon de la resurektinto, la krucon kaj la preĝejflagojn al la rajdantoj kaj adiaŭas ilin per la paska beno. La paroĥanoj kaj multnombraj gastoj kaj

9 prononcu: ĉiĥi pjatk

10 prononcu: kŝijer

turistoj rigardas.

La paskorajdantoj kantas kantojn, kiuj sciigas la venkon de la vivo super la morto. Ekstere de lokoj ili preĝas la rozarion aŭ litaniojn. Ĉirkaŭ samtempe procesio el la najbara paroĥo ekmoviĝas. Laŭ malnova moro la du procesioj ne devas renkontiĝi. La vojo tien de unu procesio estas la vojo reen de la alia procesio. Post la preĝado en la najbara paroĥo oni rajdas hejmen. Dum la malfrua posttagmezo la paskorajdantoj ree alvenas en la hejmloko. La trifoja ĉirkaŭrajdo de la preĝejo kaj de la tombejo kun la memoro al la mortintoj finas la solenan kutimritualon.

Nuntempe ekzistas naŭ procesioj de paskorajdantoj. La nombro de rajdantoparoj daŭre kreskis dum la pasintaj jaroj. Ralbitz¹¹ [pron.: ralbic] kaj Wittichenau¹² [pron.: Vitiĵenaŭ], Crostwitz¹³ [pron.: krostvic] kaj Panschwitz-Kuckau¹⁴ [pron.: Panŝvic-Kukaŭ], Radibor kaj Storcha¹⁵ [pron.: Storĵa] kaj fine Nebelschütz¹⁶ [pron. nebelŝic] kaj Ostro¹⁷ transdonas siajn paskomesaĝojn. Ekde 1993 paskorajdantoj el Bautzen¹⁸ [pron.: Baŭcen] denove rajdas al Radibor post longa interrompo.

LA ORNAMADO KAJ DONACADO DE PASKAJ OVOJ

En multaj familioj oni tradicie pripentras ovojn sanktan Vendredon aŭ sabaton. Pluraj genercioj kunsidas dum horoj por ornami dekduojn da ovoj por la paskofesto. La infanoj akiras al si tiun kapablecon jam en la aĝo de kvin, ses jaroj. Specialaj desinoj kaj spertoj pri la kolorigo estas daŭre transdonataj en la familioj. La ĝojo pri la popolarta laboro kaj la familia kunesto konsistigas la valoron de la kutimo.

Ĝis la dudekaj, en foraj vilaĝoj eĉ ĝis la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento oni senescepte uzis materialojn el la propra kamparana mastrumado por ornami ovojn: plumojn, abelvakson, betojn aŭ terpomojn. Por la farbdekokton oni boligis cepoŝelojn, arboŝelojn, grentigojn abo ruĝan brasikon. Pliajn kolornuancojn oni atingis per

11 sorabe: Ralbicy [pron. ĉirkaŭ: Ralbic]

12 sorabe: Kulow [pron.: Kuloŭ]

13 sorabe: Chróscicy [pron. ĉirkaŭ: Krusĉici]

14 sorabe: Pančicy-Kukow [pron. ĉirkaŭ: Panĉici-Kukoŭ]

15 sorabe: Bačoń [pron. Baĉojn]

16 sorabe: Njebelćicy [pron. ĉirkaŭ: Njebelĉici]

17 sorabe: Wotrow [pron.: Ŭotrou]

18 sorabe: Budyšin [pron.: Budiŝin]

aĉetitaj kolorlignojn. La vakstekniko estis pluevoluigata per superkolorigado kaj plurfoja kovrado. Origine la ornamaĵoj estis pli simplaj kaj malfajnaj ol hodiaŭ. Nur malmultaj vilaĝanoj skrapis aŭ kaŭstikizis ornamaĵojn en la ovoŝelon antaŭe malhele kolorigitan.

En la kamparana mastrumado restis nur malmulte da tempo por la ornamado de ovoĵoj. Jam paskan dimanĉon venis la multnombraj baptoj gefiloj por havigi la donacon ĉe la baptoj gepatroj. Ornamitaj ovoĵoj tiam estis la plej grava. La beleco kaj la harmonio de ornamita ovo devis transiri al la donacito. Kutime ĉiu bapta infano ricevis tri ovoĵojn. La nombro tri reprezentis feliĉon, sanon kaj benon, "zbožo¹⁹, strowota²⁰, žohnowanje²¹".

En la meza kaj malsupra Luzacio pasko iam estis la plej grava festo por la infanoj. Tiuokaze oni vestigis ilin nove. Iliaj baptopatroj abunde donacis al ili. Krom la ovoĵoj ĉiu infano ricevis plektitan paskobulkon, spickukon kun sukerglazuro kaj novan vestaĵon. Kiam la tempoj estis iomete pli bonaj, aldoniĝis monero. Oni donis same multe, kiel oni mem ricevis. En unua vivjaro la infano ricevis nekolorigitajn nekuiritajn ovoĵojn krom vestoj. Ekde la dua vivjaro la infanoj mem havigis la donacojn ĉe la baptoj gepatroj. En la jaro antaŭ la konfirmacio la baptoj infanoj dankis por la ricevita prizorgo kaj donacojn per propra diraĵo. Per tio la donaco de la baptoj gepatroj esti pli granda. Post la konfirmacio la baptopatro estis liberigita de la devigo donaci.

LA PASKA KANTADO

La pasiona kaj paska kantado estis iam vaste disvastiĝinta en la tuta Luzacio. Ankoraŭ en la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento kaj evangeliaj kaj katolikaj knabinoj iris al la paskokantado en unuopaj lokoj. Precipe Sanktan Vendredon laĵ en la paska nokto la junaj knabinoj renkontiĝis por kanti. La paska kantado estis devigo por la knabinoj en la vilaĝo. Kutime ili ricevis monobolon por sia nokta kantado, kiun la kantorka disdonis inter la knabinoj.

Iam la nokta kantado en la paskonokto ĝis la sunleviĝo estis solena kutima ĉe la evangeliaj soraboj en la Luzacia erikejo. Tri paskaj ĥoraloj estis kantataj sub la fenestro de ĉiu domo. La knabinoj antaŭ ĉio tie faris vizitojn, kie pasintjare okazis ĝojiga aŭ malĝojiga okazaĵo. La fino estis la kantado sur la benko de kantado dum la sunleviĝo. La

19 prononcu: zbojfo

20 prononcu: stroŭota

21 prononcu: žohnowanje

Kantorkoj de Schleife²² [pron.: Ŝlajfe] revivigis tiun kutimon en la jaro 1992.

Ankoraŭ hodiaŭ la knabinoj el Sollschwitz²³ [pron.: Solŝvic], Kotten²⁴ kaj Saalau²⁵ [pron.: Salaŭ] kantas kaj preĝas Sanktan Vendredon survoje al la meso por homo, besto kaj pejzaĝo.

LA PASKA FAJRO

Disvastiĝinta kaj populara en pli ol cent vilaĝoj de la malsupra Luzacio kaj en kelkaj lokoj de la meza Luzacio estas la paskofajro. Iniciantoj de la kutimo la knaboj estas, ili kolektas lignon el la vilaĝo, lignon el ruinoj kaj fortondaĵojn de fruktarboj. La stako de branĉetoj devis esti eble plej alta kaj flamegi hele. Oni kredis, ke la kampoj estos same vaste fruktodonaj kiel la brilo de la fajro etendiĝis en la lando. Krome la demonoj, kiuj malhelpis la kreskon, devis esti forpelataj per la blindiga lumo.

Ĝis hodiaŭ la vilaĝa junularo montras la ambicion tavoloigi eble ple grandan stakon. La stako devas esti gardata por malhelpi la antaŭtempan ekbruligon de la knaboj el la najbara vilaĝo. Dum la malfruaj horoj de la paskonokto la loĝantoj renkontiĝas por rigardi la flagradon de la fajro. Bruado kaj petolado apartenas al tio. La junularo uzas la reston de la nokto por fari drastajn petolaĵojn en la vilaĝo. Precipe al tiuj oni faris petolaĵojn, kiuj laŭdire donacis tro malmulte dum la zapust en la vintro.

LA PASKA AKVO

Malnovega kutimo estas la ĉerpado de akvo paskomatene antaŭ la sunleviĝo. La kredo al la puriganta kaj saniga forto de akvo estis vaste disvastiĝinta. La knabinoj esperis eternan junecon kaj beleco de la lavado per paska akvo. Survoje kaj dum ĉerpado de akvo ili rajtis nek paroli nek ridi, ĉar tiuokaze oni estus portinta "babilakvon" hejmen. Laŭdire tiu jam ne havus magian forton.

La kutimo de la akvoĉerpado estis vaste disvastiĝinta ĝis la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento kaj estis sekrete praktikata de la knabinoj post la dumnokta kantado. Ke la knaboj embuskis kontraŭ ili dum tio kaj petolis kun ili, konsistigis la specialan ĉarmon de tiu kutimo. per paska akvo oni lavis sin kaj aspergis bruton kaj plantojn.

22 sorabe: Slepó

23 sorabe: Sulšecy [pron.: Sulŝeci]

24 sorabe: Kočina [pron.: Koĉina]

25 sorabe: Salow [pron.: Saloŭ]

LA OVORULADO

En la erikejo de Bad Muskau²⁶ kaj Schleife ludo de lerteco kun buntaj ovoĵoj estis ŝatata ĝis la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento. La junularo faris ĝis paskolunde. La knabinoj kunportis siajn plej belajn ovojn kiel donacon por la knaboj. Ĉiu ricevis tri ovojn. Per tio la knabinoj dankis por la flegado de la "kantobenkoj". Dum la knabinoj ankoraŭ sidis sur la benkoj, la knaboj jam komencis la konkurson. La ovoĵoj estis malsupren rulataj sur malgranda natura deklivo. Tion oni nomis "jajka kulwaŝ"²⁷, ruli ovojn. Tiu, kiu trafis ovon, ricevis ĝin. Fininte sian kantadon, ankaŭ la knabinoj kunludis. Ovojn, kiuj difektiĝis, oni tuj manĝis. La gajninto estis nomata "kral", reĝo. Fine ĉiuj manĝis la ovojn komune.

Kun la ĉesigo de la paska kantado ankaŭ ĉesis la ovarulado. La kutimo de la ovarulado estas malnova. Origine ĝi servis por tio, ke la fekundeco de ovoĵoj transiru al la kampoj kaj herbejoj. En la Malsupra Luzacio oni konas la "walkowanje" [pron.: ŭalkoŭanje], germane: walaien [pron.: ŭalajen], ĉe kiu la ovoĵoj estas movataj tra oblikva leno en fosajon. Poste kiel antaŭe unuopaj infanoj aŭ familioj de vilaĝo renkontiĝas paskodimanĉe por tiu ludo. Hodiaŭ "walkowanje" tie kaj tie estas farita kiel soraba kutimo en infanĝardenoj aŭ aranĝata kiel speciala atrakcio dum la paskofesto.

LA BRULIGADO DE SORĈISTINOJ

La bruligado de sorĉistinoj en la valpurga nokto²⁸ estas tre populara kutimo. La sorĉistino kiel simbolo de ĉiu malnova kaj malbona estas bruligata sur granda stako de lignaj branĉoj. Sur fiksita loko ĉerande de la vilaĝo konsiderinda stako kreskas, precipe dum la printempa purigado. Dum la tagoj antaŭ la 30-a de aprilo la junuloj kolektas pli multe da brulpovaĵoj kaj gardas la stakon, por ke ĝi ne estu antaŭtempe ekbruligata de la junuloj de la najbaraj vilaĝoj. Antaŭtempa nokta forbruligado estas rigardata kiel honto por la tuta vilaĝo.

Ĉe krepuskiĝo la vilaĝanoj renkontiĝas ĉe la sorĉistina stako. En multaj lokoj estas komuna lampiona procesio kun akompano de blovmuziko. Lastatempe oni ofte starigas tendon, en kiu kolbasetoj estas vendataj kaj biero estas elverŝata. La vilaĝanoj festas per la bruligado de sorĉistinoj la alvenon de la printempo.

²⁶ sorabe: Mužakow [pron.: Muĵakoŭ]

²⁷ prononcu: jajka kulŭaŝ

²⁸ Nokto antaŭ la 1-a de majo, kiam laŭ malnova popolkredo sorĉistinoj dancis. Nomo de la nokto laŭ la katolika sanktulino Walpurga/Walpurĝis.

LA STARIGO KAJ ĴETADO DE LA MAJARBO

La majarbo estas plej ofte starigata dum la tago de la bruligado de sorĉistinoj aŭ dum la sekva tago sur vilaĝa placo resp. sur sportplaco. Ĝi estas trunko ĉirkaŭ 30 m longa, kiu estas antaŭe ĉirkauvolvata kun girlandoj. Ĝian pinton formas juna betulo ornamata per buntaj rubandoj.

La majarbo estas rigardata kiel simbolo de fekundeco kaj kresko. Tial ĝi estu kiel eble plej alta kaj devas esti strikte gardata. Se ĝi estas faligata antaŭtempe, majarbo ne devas esti starigata en la vilaĝo dum la sekvontaj sep jaroj.

Dum unu el la sekvontaj semajnfinoj la mejarba ĵetado okazas. La junuloj de la vilaĝo iras pare kun akompano de muziko al la festplaco. Spektemaj enloĝantoj formas spaliron. Poste tradiciaj popoldancoj estas prezentataj sub la majarbo. Post tio la junuloj elfosas la majarbon. Tuj kiam ĝi ŝanceliĝas kaj falas, la junuloj vetkuras ĉirkaŭ la mejarban pinton. En ĉiu vilaĝo la venkanto estas eltrovata iomete alie. La venkinto nomiĝas „mejski kral“, majreĝo. Inter la knabinoj li elektas sian majreĝinon. Poste estas honora rondiro, kaj la junuloj de la vilaĝo iras al gastejo por danci.

En la Malsupra Luzacio la pompe ornamita majarbo, la „majski bom“, estas ofte faligata je Sankta Johano kaj poste aŭkciata.

LA JOHANA RAJDADO

Dum pasintaj tempoj la homoj kredis, ke la nokto de Sankta Johano posedis miraklofarajn kuracajn fortojn. Precipe ĉirkaŭ la somera solstico multaj herboj promesis la plej grandan efikon. Surbaze de tio la kutimo de la johana rajdado estiĝis. Ankoraŭ ĝis la mezo de la 19-a jarcento ĝi estis celebrata en pluraj lokoj de la Malsupra Luzacio. Hodiaŭ oni flegas ĝin nur en la vilaĝo Casel²⁹, [prononcu: Kazel], sorabe Kozle, proksime de Drebkau³⁰ [prononcu: Drepkaŭ].

Portradicia societo speciale fondita por tio estas organizanto kaj aranĝanto de la festo, kiu ĉiujare okazas iun dimanĉon ĉirkaŭ la 24-a de junio. En la centro de la kutimo staras la figuro de „Jan“ aŭ „Johano“, kiu korpigas la kreskospiriton.

La preparoj estas tre ampleksaj. Miloj da cejanoj estas plukataj sabaton vespere por plekti longajn ĉirojn pere de ili dimanĉon matene. Tasko de la vilaĝaj junuloj estas havigi ankoraŭ fermitajn florojn de

29 sorabe: Kozle; **notu**: La loknomoj en la teksto ĉiam estas la germanaj nomoj. La sorabaj loknomoj estas menciataj en piednotoj.

30 sorabe: Drjowk [pron.: Drjoŭk]

nimfeoj por la krono de Johano dum la dimanĉa matena krepusko. Por la pompa kapornamo ĉiuj vilaĝanoj kontribuas ĝardenajn florojn. Dimanĉon ĉirkaŭ tagmezo la knabinoj vestas la johanrajdanton. Unue ili kudras la ĉirojn al lia vestaĵo, poste la granda krono estas surmetata al li.

Posttagmezon dek du junuloj rajdas kun la Johano de la gastejo al la festoplaco. Antaŭ la rajdantoj la knabinoj paŝas en siaj festotagaj vestaĵoj kaj portas duan kronon, kiun ili transdonos al la Johano vespere dum la honora dancado. Blovorkestro akompanas la procesion de la junuloj. Multaj spektantoj kunvenas sur la festoplaco. Nun la johanrajdado komenciĝas. La dek du junuloj simbolas la dek du monatojn. Kiel unua ĉiam la Johano rajdas. Dum ĉiu galopo du akompanantoj ekŝiĝas. Finfine la Johano nur sola rajdas. Nur nun bravaj spektantoj sukcesas haltigi la johanrajdanton kaj forŝiri florojn aŭ plektaĵojn de li. La floroj estas sekigataj kaj hejme konservataj. Ili alportu feliĉon ĝis la venonta jaro. Kun muziko kaj dancado la johanrajdado finiĝas.

RIKOLTAJ KUTIMOJ

La rikolta sezono estis la plej grava periodo por la kamparanoj dum la paso de la jaro. Dum la grenrikolto la kamparanoj kaj la servistaro faris tre penigan laboron. Ĝojo kaj dankemo estis grandaj, se la greno povis esti kolektita seka kaj sen perdo.

En la pasinteco la homoj kredis al demonoj de kresko kaj fekundeco. Ili supozis, ke la senforto kreskospirito fuĝas en la figuro de maljuna virkoko, sorabe „kokot“, en la lastan garbon je la fino de la somero. Por ke la kadukeco de la kreskospirito ne transiĝu en la naturon oni mortigis virkokon je la fino de la rikolto.

En la Malsupra Luzacio oni celebras rikoltkutimojn ĝis hodiaŭ kiel dimanĉan vilaĝofeston. La junuloj organizas kaj aranĝas ilin laŭ tradicia maniero. La elekto de la limdato ofte dependas de la konsento de la blovorkestro, kiu posttagmeze akompanas la kutimon per muziko. La knabinoj de la vilaĝo vestiĝas per siaj festaj dancokostumoj.

LA VIRKOKA SENPLUMIGO

Ankaŭ la virkoka senplumigo estas ŝatata kutimo en la Malsupra Luzacio. Sur finrikoltita kampo la vilaĝaj gejunuloj starigas grandan pordegon, ĉirkaŭvolvitan per ĉiroj el kverkfoliaro. Al la transversa trabo ili ligas mortan virkokon, kies kapo pendas malsupren. La kapo kaj ambaŭ flugiloj estas entrancitaj, por ke ili facile disiĝu dum la

forŝirado.

La knaboj rajdas poste en rapida galopo tra la pordego kaj provas, sin rektigante, forŝiri la kapon aŭ la flugilojn de la besto. Tiu, kiu sukcesas kapti la kapon, estas honorata kiel reĝo. La dua kaj la tria fariĝas la junuloj, kiuj kaptas unu el la du flugiloj. La venkintojn kaj ankaŭ iliajn ĉevalojn oni honoras per grandaj florkronoj el kverkfolioj. La lertaj knaboj poste elektas inter la knabinoj sian dancpartnerinon por la honora dancrondo.

Samtempe la knabinoj faras ludojn de lerteco kiel ekz. la ĉarpuŝadon de ranoj kaj fraŭloj aŭ ovokuradon por eltrovi la rikoltreĝinon. La venkantino ankaŭ ricevas florkronon. La tago finiĝas per vespera dancado.

LA MORTBATADO DE VIRKOKO

La mortbatado de virkoko apartenas al la plej malnovaj rikoltkutimoj. Ĝis la 17-a jarcento la virkoko estis mortbatata per draŝilo. Hodiaŭ oni flegas tiun kutimon nur en kelkaj vilaĝoj de la Malsupra Luzacio en simbola formo. Viva virkoko estas enfermata en malgrandan tertruon, kiu estas kovrita per tabuloj. Sur tio estas renversita potoj. La knaboj devas trafi la poton per draŝilo. Ĉe tio iliaj okuloj estas vindokovritaj. Ĉiu havas tri batojn. Tiu, kiu sukcesas fari tion plej bone, fariĝas „kral“, reĝo. Sian reĝinon la venkinto elektas kun vindokovritaj okuloj el la grupo de la rondodancantaj knabinoj.

Laŭ malnova moro la virkoko ricevas poste la liberecon kaj la knaboj devas provi kapti ĝin per nura mano. Vespere oni aŭkcias ĝin kaj finfine ĝi venis en la kuirpoton.

VINTRAJ KUTIMOJ

Dum la malfrua aŭtuno kaj dum la vintro la kapolaboro ripozis. La longaj, malhelaj vesperoj permesis iomete pli multe da trankvileco kaj sociemo. Por la kampano kaj la servistaro estis malgraŭ tio serio da devigoj kiel ekz. draŝi grenon, faligi lignon, maldensigi arbojn, haki brullignon, ripari ilaron, plekti korbojn kaj ligi balailojn.

La kampanino tamen faris hejmajn laborojn, ekz. ŝpini, teksu, triki, kudri kaj – kune kun la najbarinoj – senbarbigi plumojn. Kulmino de la mastruma jaro estis la hejma buĉado. Al la buĉado de porkoj la vilaĝaj gejunuloj kunvenis por peti kantante pri kolbaso. La infanoj havis dum la vintra sezono pli multe da tempo por ludi. Krome ili flegis diversajn kutimojn, ĉe kiuj ili ricevis donacojn.

En malmultaj vilaĝoj konserviĝis kelkaj vintraj kutimoj, kiuj estas

celebrataj nerimarkate de la publiko. Ili estas nespektaklaj kaj ofte diferencas unu disde la alia aŭ jam ne estas konataj en la najbara vilaĝo. La kutimaro ĉi tie klare havas religian karakteron.

LA MARTENFESTA KANTADO

La tago de Sankta Marteno (11-a de novembro) enkondukas la vintron. La festo de tiu sanktulo signifis la finon de la mastruma jaro. En la pasinteco tiu tago estis grava limdato por la pagado de impostoj kaj interezoj. La farmo devis esti pagata. La tempo de buĉado komenciĝis. El ĉiu de tio eble evoluis petiroj. Sankta Marteno fariĝis donacanto por infanoj.

Sankta Marteno estas adorata kiel „episkopo de la malriĉuloj“. La martenfesto estas la memortago por la episkopo Marteno de Tours. Laŭ legendo li dividis kiel soldato sian mantelon donante unu duonon de la mantelo al almuzulo.

Ankoraŭ hodiaŭ infanoj el la paroĥoj de Nebelschütz, Ostro, Ralbitz kaj Crostwitz iras posttagmezon de domo al domo kaj kantas antaŭ la pordo. La infanoj fariĝas ĉiam pli junaj, la donoj laŭ la bonstato pli grandaj. Se estis en la pasinteco nur unuopaj bombonoj, estas tio nun tuta saketo. Fruktoj el la ĝardeno cedis al aĉetitaj fruktoj aŭ maĉgumo kaj ĉokolado. El memkudrita saketo fariĝis plastosako.

La mastrino preparas la donojn en granda pelvo, la infanoj de la vilaĝo estas atendataj posttagmezon aŭ fruan vesperon por petado. Oni volonte donas kaj ne parolas pri elspezoj, ĉar „Donacado alportas feliĉon kaj benon“.

Dum la lastaj jaroj preĝejo kaj lernejo kreske organizas martenfestajn procesiojn kun prezento de la manteldivido, laternprocesioj kaj komuna kantado kaj preĝado, en kiuj infanoj kaj gepatroj partoprenas. Ofte la figuro de Sankta Marteno kunrajdas sur ĉevalo.

En la paroĥo de Wittichenau delonge estas kutimo, ke la baptoinfanoj iras al la baptaj gepatroj por preni sian martenfestan donacon. En antaŭaj tempoj ĉiu baptopatrino donacis du grandajn sespartajn bulkojn, la martenfestajn bulkojn, kaj krome pomojn aŭ pirojn. Ĉar bulkoj venis sur tablon nur dimanĉe, martenfestaj bulkoj estis io sufiĉe eksterordinara por infanoj. Ekde la sepdekaj jaroj de la 20-a jarcento oni donas nur unu bulkon, anstataŭ tio pli multe da dolĉaĵoj.

SANKTA BARBARA

Al la plej ŝatataj gesanktuloj apartenas Sankta Barbara. La donacantino Sankta Barbara estas iam multege pli disvastiĝinta en la

katolikaj sorabaj vilaĝoj.

Hodiaŭ nur en la paroĥo de Wittichenau la „Borborka“, la sankta Barbara, iras en la antaŭvespero de la festo de Sankta Barbara al malgrandaj infanoj. La Borborka estas akompanata de du aŭ ankaŭ pluraj strangaj kunuloj, kiuj sorabe nomiĝas “rumpodich [pron.: rumpodiĥ]” aŭ “rumplich [pron.: rumpliĥ]”.

La Borborka estas bonfara kaj silentas. La akompanantaj kunuloj tamen demandas, laŭdas aŭ mallaŭdas la infanojn. Borborka anoncas sian venon per frapado al la fenestro aŭ per mallaŭta sonorigo. La gepatroj bonvenigas ŝin. Ĉiuj preĝas la Patronia. Silente ŝi donacas al ĉiu infano dolĉaĵojn, pomojn kaj nuksojn. Iam la Borborka estis vestita en partoj de la festa kostumo de fianĉinfraŭlino. La vizaĝo estis vualita kaj sur la kapo ŝi portis la kronon de fianĉinfraŭlino. Sur la dorso estis du memfaritaj flugiloj, sur la brusto la perlreto de la fraŭlina kostumo briletis. Al unu el la fingroj, kiuj estis en blankaj gantoj, trembrilanta ringo estis ŝovata kaj la laĉoŝuojn oraj bantoj ornamis. Tiom da brilo kaj pompo povis porti nur ĉiela estaĵo.

La pli bonstataj kamparanoj donis al la Borborka donacojn por la infanoj de siaj taglaboristoj kaj sendis ŝin al ili.

SANKTA NIKOLAO

En la antaŭvespero de la 6-a de decembro Sankta Nikolao venas en akompano de du aŭ pluraj kunuloj al la infanoj. Preĝon kaj kantadon sekvas la admono al la infanoj. Poste Sankta Nikolao transdonas malgrandajn donacojn. Lia vestaĵo kun mitro kaj episkopa bastono montras al la katolika episkopo Nikolao de Myra³¹.

La 5-an de decembro en la paroĥo de Wittichenau la infanoj starigis talerojn sur la tablon aŭ etendis siajn antaŭtukojn por la donoj de Sankta Nikolao. Estis kutime, ke oni disdonis al ili unu aŭ du malgrandajn bakitajn kronojn. Aldoniĝis ankoraŭ malmultaj bombonoj, kelkaj pomoj kaj nuksoj. En antaŭaj tempoj ĉiu patrino bakis nikolaokronon el dolĉa pasto de tritika faruno por ĉiu infano, plenigis ĝin per marmelado kaj ornamis ĝin per sukerglazuro. La membakita krono estas ne plu kutima hodiaŭ.

La posttagmezon de la 6-a de decembro la infanoj en la paroĥo de Radibor iras en grupetoj de domo al domo kaj petas kantante pri donoj. Germanaj infangrupoj kantas ordinaran kanton pri Sankta Nikolao, sorabaj infanoj tamen la tradician petkanton. Iam la infanoj

31 antikva urbo en la hodiaŭa Turkio, ĉirkaŭ 160 km sudokcidente de la mediteranea urbo Antalya.

ricevis pomon kaj unu aŭ du bombonoj kiel nikolaofestajn donojn, hodiaŭ tamen ili ricevas pli multe da dolĉaĵoj.

Vesperon procesio de infanoj okazas en Radibor, kun la pastro sur ĉevalo. Infanoj de la infanĝardeno kaj de la baza lernejo iras kun siaj gepatroj en la granda lampiona procesio tra la vilaĝo ĝis la preĝejo.

LA DONACINFANO

Dum la antaŭkristnaska tempo en la vilaĝoj ĉirkaŭ Schleife la donacinfano, sorabe „džěćetko“ [pron. ĉirkaŭ: ĝiĉetko], iris tra la malhela vilaĝo kaj gastis en multaj domoj.

Tio estis ĝis la kvindekaj jaroj de la 20-a jarcento kutimo de la knabinoj el la ŝpinĉambro. Ili informiĝis ĉe la gepatroj, ĉu ilia veno estas bonvena. Nur tiu, kiu povis donaci ion al siaj infanoj ankaŭ ekstere de la kristnaska festo, atendis la džěćetko-n. La infanoj de la vilaĝoj iris kun la džěćetko kaj venis kun ĝi en la ĉambron por observi la okazadon kaj partopreni en la ĝojo de la donacitoj.

La „kantorka³²“ disponis, kiu estu la džěćetko. Kutime tio estis la knabino, kiu edziniĝus en la sekvonta jaro kiel unua. Bazo de la vestaĵo de la donacinfano estis la kostumo de fianĉinfraŭlino. Por la ornamado la knabinoj kunportis banton aŭ rubandon. En ĉiu vilaĝo oni vestis la džěćetko diversmaniere. La vizaĝo estis vualata per kurteno, por ke oni ne ekkonu la knabinon. La džěćetko ne devas paroli. Sian venon ĝi anoncis per mallaŭta sonorigo.

Hodiaŭ la kutimceremoniaro iomete ŝanĝiĝis. La donacinfano estas akompanata de du knabinoj en kostumo. Unu portas la stallanternon por lumigado kaj la dua la korbon kun donoj. Kun la ornamita vivovergo ili batas la plenkreskulojn trifoje sur la maldekstran ŝultron, kio alportu benon, sanon kaj feliĉon. Al infanoj la donacinfano karesas vangon. Tre ŝatata estas tiu kutimo hodiaŭ en adventaj solenoj por infanoj, maljunuloj aŭ en domovinaj grupoj. Ĉi tie la apero de la džěćetko apartenas al la solena ritualo de la kontemplado. La donaco restas malgranda, ofte ĝi estas nur ruĝa pomo. La batado per la vivovergo formas la dignon de la kutimo.

En kelkaj vilaĝoj ĉirkaŭ Hoyerswerda³³ [pron.: Hojersverda] kaj en Jänschwalde³⁴ [pron.: Jenŝvalde] la kutimo estas simile festata kun loktipa donacinfano.

32 antaŭkantantino en ŝpinĉambro

33 sorabe: Wojerecy [pron. ĉirkaŭ: Ŭojereci]

34 sorabe: Janŝojce [pron.: Janŝojce]